

# Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 37<sup>an</sup> jaro

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k134/k134.html>

*Homo, kiu ne honoras siajn tradiciojn, ne indas sian heredaĵon*

*Se me Esperanto, esperantistoj venkas*



*Al Hispanio doloras Valensja katastrofo!*

N<sup>o</sup> 134<sup>a</sup>

Januaron de 2025<sup>a</sup>

# Kajeroj

Bulteno de la Hispana Asocio de  
Laboristoj Esperantistaj (HALE).

## el la Sudo

Calle Jabonerías, 6.3<sup>o</sup> D  
30010 Murcia  
Hispanio

# Enhavo

**Redaktore:** Gratulon je la komenco  
de la jaro.....3

**Literaturo:** Romano historia.....4

**Funebro:** Kaj Hispanio ankoraŭ  
doloras!.....7

**Pensigoj:**

La Reĝoj kaj Sankta Nikolao....8

**Beletro:** Sireno de Serenin' .....11

**Defendo de Hispanismo:**

Nekomparebla laboro.....12

La ago de la Reĝoj.....14

Tuta urbo en insulo.....17

Gŭaraniaj misioj.....18

ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**

Redaktas: **Jesuo de las Heras.**

Korektas: **Jozefo Pina.**

Retskribu al: [kajeroj@gmail.com](mailto:kajeroj@gmail.com)

**Pri la enhavo de la  
artikoloj respondecas ties  
aŭtoroj, ne la redakcio.**

**Nesubskribitajn artikolojn  
verkis la redaktoro.**

**Ni ne korespondos pri nepetitaj  
artikoloj, kvankam ni klopodos  
publikigi ĉiun artikolon, kiun ni  
trovos interesa .**

**Kovrilo:** En Hispanio oni forlasas la kutimon inrterdonaci je la 6<sup>a</sup> de januaro, la Tagon de la Magiaj Reĝoj, favore al Sankta Nikolao, la 24<sup>an</sup> de decembro, bedaŭrinde. Ĉar funde estas politika kaj sociala kialoj. Ni ne perdu tradicion!

**Pagmaniero:** aliĝu al HALE kontraŭ €10  
jare por ricevi la surpaperan version de nia  
magazino.

**Se vi deziras kontibui per aliĝo,  
kontaktu la redaktoron:  
[kajeroj@gmail.com](mailto:kajeroj@gmail.com)**

**Oni povas reprodukti la enhavon, kondicè,  
ke oni citu la originon.**

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:  
**Scribus, Bluefish, LibreOffice, Gimp, kaj Yafc.**

Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.



Redaktore

## Optimisme pri la Nova Jaro

**N**ova jaro jam komencas, kaj la esperantistaro ankoraŭ ne povas fieri pri tio, ke Esperanto venkis!

Laŭ mi, tamen tio estas kaj restas neprudenta kaj nekonvena sopiro. Jes, Esperanto ne venku, sed esperantistoj venkas pro tio, ke ni uzas Esperanton. Tio estas, laŭ mi, ne pli, sed ankaŭ ne malpli ol ilo por interkomprenigo. Tute senlima, tute facila —se kompare al aliaj denaskaj lingvoj, ĉar ĝin ne inventis senalfabetuloj, kiel okazis pri la tiel nomumitaj *naturaj* lingvoj, kvankam pli trafe estus nomumi ilin *elnealfabetaj*.

Jes, eble oni ekpensos, ke mi blasfemas dirante, ke niaj kormolaj denaskaj lingvoj, tiuj lingvoj de niaj gepatroj, per kiuj ni unue lernis ami kaj karesi, ekkompreni la mondon, kaj ek trovi pri tio, kio vivo temas! Sed jes, kompreneble, devis estis stultuloj, tiuj, kiuj desegnis lingvojn, kiuj bezonas tri konjugaciojn verbajn por diri tion, kion oni povas diri per nur unu en Esperanto kaj —honeste estas agnoski— ankaŭ en la angla lingvo. Sed, tamen, devas esti stultaj homoj tiuj, kiuj elpensis lingvon, kion oni parolas kaj skribas per alia maniero, same kiel oni faras en la angla,

kvankam, denove honeste estas agnoski, en la hispana oni preskaŭ faras same kiel en Esperanto: unu litero por ĉiu sono, unu sono por ĉiu litero. Mi diras preskaŭ, ĉar oni diras *b* kiam oni hispane skribas *b*, *v*, kaj *w* —kvankam stultuloj prononcas tiun lastan kiel ŭo pro influo de eksterlanda lingvo, la angla, kiun preskaŭ neniu parolas en Hispanio, almenaŭ kompetente.

Sed mi malkovras nenion al esperanta parolanto, ĉu? Eble denaska esperantisto —ie ajn li aŭ ŝi estu— pensos tiel, ekalproksimiĝante al la hispana aŭ angla lingvoj; sed ankaŭ al la germana aŭ pola, en kiuj oni uzas du au tri literojn por ununura sono; aŭ al la franca, kie multajn literojn oni devas skribi, kaj tamen neniam prononci, kiel *lasta e* en *elle* aŭ *mechante*. Kaj tiel granda plu dise tra la ceteraj 3000 lingvoj, kiujn oni parolas tra la mondo!

El tio mi konkludas, ke ne, Esperanto ne venkis. Sed esperantistoj jam venkas trans la tuta mondo ĉiam, malfermante sian buŝon, klavarante per interreto, parolante al aliaj esperantistoj de aliaj partoj de la mondo kies lingvon ili ne regas, kaj kiuj ankaŭ ne regas la lingvon de la kunparolanto aŭ kunscribanto. Jen venko de esperantistoj, se ne



de Esperanto!

Pro tio mi novjare gratulas al ĉiu esperantisto en la mondo!

Antaŭ kelkaj semajnoj mi estis en kunveno, kie oni parolis pri morto, kaj la konversacio fluis per stranga penskatenoj al Esperanto, kaj ne mankis tiu, kiu diris, ke neniu parolas tion. Mi kompreneble, ridete komunikis, ke mi parolas ĝin de kelkaj jardekoj, kaj ili mem ankaŭ povus, se ili sukcesus enkapigi la dek ses reguloj de Ludoviko, kaj ekzempligante tion, kion mi klarigis, ili sukcesis kompreni kvar el ili: pri nomo, adjektivo, verbo kaj la tri participoj, kiuj ververe estas ses (kaj aktivaj kaj pasivaj). Ili ne sukcesis decidi lerni Esperanton, sed mi sukcesis malridigi ilin pri nia lingvo, ĉar oni ridas ĉiam al tio, kion oni ne komprenas, ĉu ne?

Sekve, mi ree gratulas al vi, esperantisto, kiu legas tion ĉi, ĉar vi sukcesas kompreni kaj legatan kaj parolatan Esperanton! Dum multe da jaroj vi ade faru tion!

*Beletre*

## ROMANO HISTORIA

**N**e, ne timu, mi ne donos al vi kurson pri tiu interesa literatura ĝenro, nek eĉ gvidliniojn por ĝin legi. Mi nur prezentos kelkajn opiniojn, kiuj lastatempe estis ĵetitaj al mi kiel ponardojn pri tiu temo.

Okaze de mia kritiko —mi konfesas, iom kaŭstike— de tiu forgesinda filmo, kiu ĉefrolas interalie Brad Pitt, titolita *Malbenitaj bastardoj* (mi rifuzas reprodukti la titolon en la angla, kvankam tiel ĝi estis montritaj ĉe hispanaj kinejoj) en kiu oni falsigas la morton de Hitlero, oni provis rezoni al mi tiam, ke en kinarto —se tiu iel

artas— oni povas ĉion diri kaj ĉiel ajn prezenti aferojn, al kio mi ne konsentis kaj ne konsentas, kvankam oni scias, ke en kino ĉio estas mensogo. Eble pro tio ni ĉiuj tiel ŝatas ĝin, almenaŭ la filmojn, kiuj estas bone faritaj kaj diras ion, ĉar tiuj ja ekzistas, ne neigeble.

La alia kazo estas pli serioza, ĉar tio implicas literaturon. Oni diris al mi, ke *se mi volas lerni historion, mi iras al historiolibro, sed se tio, kion mi volas, estas pasigi agrablan tempon kun romano, mi ne esperas ke ĝi estu respektama al la historio!* Tio estas, ke ĉio iras ankaŭ en literaturo. Ĉar *se ne, sciencfikcio havus neniun kialon ekzisti.*

Konsiderante unue la duan sensencaĵon, sciencfikcio ja havas kialon esti, ĉar la aŭtoro komencas de tio, kion li scias — fakte de tio, kio estas konata en la momento de verkado de sia romano— kaj fantazias pri tempo aŭ loko, kiuj ankoraŭ ne ekzistas. Kiu povus kulpigi Julion Verne-on, ekzemple pro la teknologiaj eraroj troveblaj en liaj verkoj? Tiutempe, kiam li skribis ilin, la priskribitaj eventoj estis estontaj, kaj se li eraris pri io, tio ne malpliigas la kvaliton de tio, kion li rakontas al ni. Se ili estus skribitaj hodiaŭ, tiuj eraroj ne estus pardoneblaj, kiel tiuj en la proceduro -ekzemple- atingi nian sateliton en lia romano *De la Tero al la Luno*, aŭ kiel ili forlasas la internon de nia planedo en *Vojaĝo al la Centro de la Tero*, kaj tiel laŭ liaj ceteraj romanoj. Ekzistas ankaŭ aliaj sensencaĵoj, kiujn ŝajnas, ke la hodiaŭaj sciencfikciaj verkistoj —kaj bedaŭrinde ankaŭ legantoj — supozas, kiel ekzemple hiperspaco kaj tempovojaĝado, kun la akompanaj paradoksoj, kaj ankaŭ alternativaj templinjoj, kiujn alian tagon ni povus kritiki, se ni havus la tempon kaj ŝancon. Ĉar ne ĉio iras, eĉ ne en sciencfikcio. La eksplodoj, ekzemple, en filmo *Milito de steloj* ne povas aŭdiĝi, ĉar en kosma spaco ne estas aero aŭ

alia gaso por transdoni sonon. Ĉiutage steloj eksplodas ie, kaj eĉ se la lumo de tiuj eksplodoj atingus nin, ties sonon oni neniam aŭdus.

Se ĉi tio estas negravaj stultaĵoj, la antaŭaj estas ja gravaj sensecaĵoj, se ne majusklaĵ: kiam oni prenas libron en la manojn, oni lernas, ĉu oni volas ĉu ne. Pri kion fari, aŭ kion ne fari. Oni lernas novajn vortojn, vastigas sian vortprovizon, vastigas sian pensmanieron kaj alrigaro pri la mondo, ĉu volonte, ĉu ne volonte, ĉar oni klopodas kompreni tion, kio estas skribita tie. Ofte oni eble devos legi du aŭ trifoje frazojn, kies signifon oni ne malkovris la unuan fojon, aŭ se oni estas fervora, ofta kaj sperta leganto, oni povas legi tre rapide, diru 500 aŭ pli da vortoj po minuto. — interkrampe mi havas amikojn, kiuj sukcesas fari tion je rapideco de mil vortoj po minuto, kaj sekve ili kapablas doni ekzaktan resumon pri tio, kion ili legis, kiu povas esti ekvivalenta al du A4-paĝoj po minuto—. Oni aldone povas eltrovi ĉion, kaj tamen lerni novajn konceptojn kaj vortojn per la nura komparo kun la kunteksto. La leganto povas ankaŭ plifortigi sian ortografikonon (ĉu oni scias ĉu ĝi havas akĉenton aŭ ne, ekzemple), kaj malkovri la ridindecon de tiom

da redakciaj redaktoroj, kiuj metas akcenton sur vortojn kiuj ne havas ĝin, kaj ne sur aliajn samkazajn vortojn, ĉu metis ĝin tiel ĉu ne la aŭtoro mem en la manuskripto, kiun li sendis al eldonisto.

Sed krom ortografio kaj vortprovizo, en historia romano oni povas lerni multe da historio, malgraŭ tio, kion diris al mi tiu kolera sinjorino: nur rigardu la bonegajn verkojn de aŭtoroj kiel Santiago Posteguillo, ekzemple, kiu verkis solidajn trilogiojn pri Scipio Afrikano, Julio Cezaro kaj la imperiestro Traĥano, inter aliaj; aŭ tiujn, kiujn Arturo Pérez Reverte verkis en la medio de la 18<sup>a</sup>, 19<sup>a</sup> aŭ 16<sup>a</sup> jarcentoj. Kompreneble, ĉi tiuj aŭtoroj, kaj multaj aliaj —inter kiuj mi ne povas rezisti citi la grandan Margarita Yourcenar (kun ŝiaj *Memuaroj de Hadriano*)— ĝenis sin dokumenti pri la tempo, uzoj kaj kutimoj de siaj roluloj. Ĉar la historia romano povas esti agrabla maniero instrui ĝojante (aŭ lerni ĝuante, kiom ajn sentema viestas). Se libro — laŭ mi — de agado bazita sur la pasinteco ne estas rigora kun la elektita historia kadro, ĝi ne estas serioza, kaj ne konsiderata

de leganto kompetenta.


Ĉio ĉi estiĝis el la legado de forgesita kaj forgesinda libro, tiom tiaj, ke mi ne diros ties titolon, de moda verkistino, Rosa Montero, en kiu aperas en la 11<sup>a</sup> jarcento aferoj, kiuj ne okazis ĝis la 19<sup>a</sup> jarcento.

Eblegas, ke vi, leganto, ne konsentos kun mi, sed se mi iom pripensigis vin pri la temo, mi estos kontenta.

Vi bone legu.

## Memorias de Adriano

Marguerite  
Yourcenar

pocket  edhasa



## Kaj Hispanio ankoraŭ funebras!

**H**odiaŭ Hispanio estas en funebro. Antaŭ kelkaj monatoj, la 29<sup>an</sup> de oktobro grandega **malvarma guto** falis sur niajn kampojn kaj urbojn, precipe tiujn de Valensjo, kaj okazigis ondegon da akvo, kiu prenis la vivon de pli ol ducent homoj, kaj la posedaĵojn de multaj pli. Nun politikistoj ankoraŭ kulpigas unuj al la aliaj, kiel kutime, sed oni ne povas ne demandi sin kial aŭtomataj protokoloj ne estis ekigitaj por mildigi la damaĝon.

Anstataŭe, ŝajnas, ke la administraj korpusoj paralizis sin, atendante ke aliaj donus ordonojn. Ŝajnas, ke Francio kaj la cetera Eŭropa Unio havis rimedojn specialigitan pri katastrofoj, kiuj povus esti helpintaj, sed la ordono ne alvenis. Ĉu konfuzo de povoj? Kaj kion ni zorgas pri la kompetentecoj de unu aŭ de la alia?

Ĉar gravas por ni, ke oni prizorgu tiujn homojn, kiuj dum tagoj ne manĝis, sen ŝirmiĝi kaj kun la timo, ke la akvotromboj ripetiĝos.

Nuntempe la problemoj fariĝis tutmondaj, kaj la nekompetenteco de tiuj en respondecpostenoj estas do multe pli evidenta. En Usono oni anoncas katastrofojn semajnojn antaŭe, por ke homoj povu sin protekti, sed ŝajnas, ke ĉi tie venis la averto, kiam la katastrofo jam okazintas. Multaj, kiuj estis irantaj aŭ revenantaj de la laboro, estis senmovigitaj sur la vojo, estis vojoj kaj stratoj, kiuj malaperis, englutitaj de akvo, kaj estis ankaŭ tiuj, kiuj, por savi aŭtomobilon, perdis ion multe pli valoran ol

tio: sian vivon. Mankas al ni civitana edukado, jes, sed la komisiitoj provizi al ni ĉi tiun instruadon malŝparas tempon inventante krimojn de feminisma patroneco anstataŭ iri al la ĉefa afero: la konservadon de la homa vivo.

Kaj oni ne povas ne pensi, ke se ekzistus demokratio en Hispanujo, tiuj ĉi nekompetentaj uloj neniam oficus, ĉar tiu, kiu estus en la povo estus postulata, ekde la civitana nivelo, havi civilajn, krimajn kaj politikajn respondecojn, kaj ĉi tiu lasta havus neniam senĵuran protekton. Decaj aŭtoritatuloj devintus renonci al sia ofico, por ke aliaj, pli kompetentaj, povu solvi la katastrofon.

Tial ni ne povas forigi la mantron **Ne voĉdonu, ĉar tio estas pli malbone!** Ĉar vi voĉdonas, vi havas ĉi tiujn politikistojn, kies sola deziro estas venki la venontajn balotadon. Ĉar oni voĉdonas, oni ne havas politikistojn, kiuj zorgas pri nia bonfarto. Ĉar voĉdoni en ĉi tiu korupta partia sistemo ne ŝanĝos ion ajn. La tago, kiam vi, leganto, havos la eblon voĉdoni por ke la reprezentanto de via distrikto forlasu la oficejon, la tagon kiam vi havos la komunan povon eksigi la politikiston, kiu ne plenumas sian devon al ni, tiutage estos demokratio en Hispanio. Kaj aferoj kiel ĉi tiu katastrofo en Valencio estos antaŭviditaj kaj la granda morteco estos forigita. En 1957<sup>a</sup> io simila okazis, sed nur 80 homoj mortis. Nun, kun multaj pliaj kaj pli bonaj rimedoj, tiu nombro da viktimoj pli ol duobliĝis. Kion ni atendas? Ĉu ni denove levos la ŝultrojn kaj daŭrigos voĉdoni por nekompetentuloj nur ĉar ni pli ŝatas ties ideologion?



## Tradicie

## Reĝoj kaj Sankta Nikolao

**M**i atestas kun ioma konfuzo la uzurpon de la Tago de la Tri Reĝoj fare de la Tago de Sankta Nikolao rilate donacojn. Ĝi ne estas la sola festo, kiu estas kopiita de la Anglosfero malprofite de niaj tradiciaj kutimoj.

Ĉi tio povas ŝajni kiel la kritiko de grumblemo (aŭ, kiel diras la snobaj homoj, *grinch*), sed mi iras ien pli ol la grumblemo: pro tiu etanimeco, kiun ni havas en la registaro nun reganta en nia lando, kiel la ekzemplo, se multe disvastiĝas tiu emo, mi jam vidas nin reveni al laboro -nu, tiujn, kiuj ankoraŭ laboras, kompreneble, ĉar mi mem jam faris tion nur ĝis kiam mi emeritiĝis - la 2<sup>an</sup> de januaro, same kiel okazas en la anglosfero kaj la cetera mondo, krom en nia lando, kiu je la momento estas la plej bona el la mondo ĉar ni havas la Tagon de la Tri Reĝoj de la Oriento kaj multajn aliajn aferojn, kiuj iom post iom falas sen rimarko de la plebo, ĉar oni estas anestezataj de televido kaj Holivudo, krom de la aro da friponaj homoj, kiuj nomas sin intelektuloj, sed kiu ankoraŭ havas la prefikson *kvazaŭ-* ĝis ilirekonsciiĝos kaj falos el sia nuboj.

Ekzemple, *Halloween*. Tiu

irlanda kutimo estis eksportita al Usono, kaj nun ŝajnas, ke la jankioj eksportas ĝin tra la tuta mondo. Nu, perverse estas, ke ili ne eksportis ĝin al Hispanio, sed preferinde la hispanoj adoptis ĝin *motu proprio* (propravole, latine), ŝajne, ĉar tiel ili pli similas al la civitanoj de la Jankia Imperio, sen rimarki, ke ili neniam iĝos tiel, sed servistoj ĉiusence, ĉar la jankioj, kiel bonaj heredantoj de la angloj, neniam traktis la loĝantojn de siaj kolonioj kiel civitanojn, sed kiel servistojn, aŭ almenaŭ duaklasajn civitanojn, kun kiuj ili ne povis miksi laŭleĝe, male al la hispanoj, kiuj laŭ ordono de la reĝino Isabela la Katolikulino, edziĝis al indianinoj, kaj hispaninoj edziniĝis al indianoj, kvankam fakte ne estis leĝo, sed deziro esprimita en reĝa dokumento. Ĉu oni povas imagi Elizabeton la 1<sup>an</sup> de Anglujo diri same? Ne tion mi vidas! Ĉar la dua estis protestanta, dum la unua estis katolika. Vi eble sciolas pri tio, kiumaniere ĝi rilatas al tio, sed katolika doktrino diras, ke ĉiuj homoj estas filoj de Dio, inkluzive de indianoj, kaj sekve egalaj. Same kiel la indiĝenaj homoj de aliaj lokoj kiel Gvamo kaj Filipinoj ankaŭ. Sed protestantoj, ekde la tempo de Lutero, diris, ke nekredantoj devas esti persekutataj. Sekve ili



malhumanigis ilin per pejorativa termino, *papistoj*, kaj tio donis al ili la povon mortigi ilin, kiel faris la germanaj princoj, kiuj sekvis la frenezan monaĥon. Nuntempe estas malbele mortigi aŭ bruligi ilin, sed ili neniam estos traktataj kiel egaluloj.

Sed la afero ne ĉesas tie. Estas diraĵoj vulgaraj, kiuj estas anstataŭigitaj de anglaĵoj: *Dio mia!* estas diraĵo, kiun junuloj ne plu uzas, ĉar pli mojose estas diri **OMG!**, eble ignorante, ke tiu ĉi akronimo signifas *Ho, mia Dio!*, tio estas, *Ho, mia Dio!*, per kiu ili plue asertas la tradician hispanan diraĵon, eĉ se per alia lingvo, kiun ĉiuj diras ke ili konas, sed tamen ili ne regas. Ĉar alie ili iras al la eĉ pli tradicia, tutetipa *Damne!*

Alian tagon mi pliprofundigos pri la misuzo de anglaj vortoj kaj frazoj en nia lingvo, pro -laŭ mia humila opinio- nescio de ambaŭ lingvoj, ĉar tiu nia estas multe pli riĉa je paroloj, vortoj kaj diroj ol ĝi, kiel pruvas la malpli granda kvanto de prunteprenoj prenitaj el aliaj lingvoj, escepte en la kampo de kiĉuloj, kompreneble, kie ili ĉiam penas pruvi, ke ili konas aliajn lingvojn, prefere tiun de la Jankia Imperio, por kiuj la pleboj -kiuj ne konas- admiras, aŭ almenau ili deziras, ke oni admiru ilin, sen rimarki, ke tiuj,

kiuj ilin imitas, ne konscias pri tio, kion ili diras, kaj koleras, kiam oni demandas al ili, kion diable ili celas diri. Kaj tiu kolero originas, laŭ mi, el konstato pri tio, ke ekzistas iu, kiu ne sindetenas demandi, kion ili devintus demandi, sed ne kuraĝis eviti aspekti eksmoda.

Sed, laŭ miaj antaŭaj vortoj, mia plendo hodiaŭ estas, ke homoj forlasas la Tri Reĝojn favore al Sankta Nikolao, Patro Kristnasko aŭ kiel ajn oni volas nomi lin, ĉar, oni diras, ke tiel la infanoj, kaj mi supozas ankaŭ la plenkreskuloj, havas pli da tempo por ludi kun la novaj donacoj. Tio estas perversigi ripoztempon. La kristnaskaj ferioj ĉiam celis en Hispanio, ripozon de onia labordevoj aŭ studolaboro, precipe ĉe teneraj infanoj, kiuj estas streĉataj de aferoj, kiujn ili devas scii eĉ se ili ne ĉiam komprenas ilin. Kaj certe estas aferoj, kiujn ili povas fari sen tiuj ludiloj aŭ aparatoj, kiujn Nikolao alportos al ili. Se tiam ili atendas ĝis la tago post la Tri Reĝoj por reveni al klaso..., sen donacoj tiutage, kial festumi tiun tagon? Ni kopiu denove la anglojn, kaj forigu la dek du tagojn de Kristnasko, kiuj por ili estas reduktitaj al unu, kvankam ili donas al lernejoj iom pli ol semajno por ludi. De la 25-a de decembro ĝis la 1-a de januaro, kaj sufiĉu!

Alia afero estus, se ili postulus la 6an de januaro kiel religian kaj civilan feston, kaj post iri al meso ili ekludus per siaj novaj ludiloj ĝis la sekva tago, kiam ili revenos al siaj lernejoj aŭ labordevoj.

Cetere, kaj sen intenci krei polemikon, mi komprenas, ke en lernejoj –kaj mi ne scias ĉu ankaŭ en laborlokoj– oni donas libertempojn al hispanoj de islama religio por ekflugi dum la Ramadana festo. Ne al katolikoj. Mi komprenas, ke estas do grava maljusto, ke lernejoj de la islama religio ĝuas ankaŭ kristnaskajn feriojn, kaj mi eĉ havas la impreson, ke

estas insulto al ili —same kiel proponi ŝinksandviĉojn en la lerneja manĝejo— ke ili ferias tiutempe; permesu al ili lerneji dum tiuj tagoj, kiam oni festas la naskiĝon de Jesuo Kristo, ĉirkaŭ kiuj turniĝas la kristana religio, kiu por ili estas herezo.

Kaj nenio pli. Mi lasas tie la ideon, por ke la tago, kiam estos vera demokratio en Hispanujo, tio estas, la tago, kiam la deputitoj obeos al ni, la popolo, anstataŭ ili, la gvidantoj de siaj partioj, ili agos ion pri la afero.

Kaj intertempe mi deziras al vi ĉiuj Feliĉan Novjaron.



## Sireno de Serenin'

## Antaŭparolo.

Ĉi tiu estas la lasta romano, Ĉkiun mi verkis je 2024<sup>a</sup>. Mi publikigos ĝin laŭ la venontaj numeroj de *Kajeroj el la Sudo*. Temas pri naiva naĝanto, kiu ripozas surface de Maro Mediteraneo, kiam marvirino trovas lin, kaj pri tio, kio okazas al li.

Antaŭ kelkaj monatoj mi legis mirindan romanon, La Maljuna Marvirino, kiun José Luis Sampedro publikigis antaŭ 34 jaroj. Tiun libron mi ĝuis, kaj ĝi inspiris ĉi tiun al mi.

Tamen, ĉi tiu libro ne estas kopio aŭ similo de tiu, sed sugestis al mi tiu legado: La marvirino de Sampedro adaptiĝas al vivo surtera, en pasinta tempo, tiu de romianoj, dum mia marvirino estas viro nuntempa, kiu al kutimiĝas al uzoj kaj kutimoj de marpopolo, kaj malkovras —kaj igas nin malkovri— ke alia mondo estas ebla, ĉar ĝi ekzistas kaj estas en ĉi tiu.

Marviro de Serena estas fantazia rakonto, la 78<sup>a</sup> en kiu mi estis implicata, sed ĝi ne estas

sciencfikcio, sed fantazia fikcio. Miaj sirenoj ekzistas ĉar ili ĉiam ekzistis, same kiel ĉimpanzoj ĉiam estis en la mondo sen tio, ke la aŭtoroj kiuj rakontis pri ili, kiel Edgar Rice Burroughs kun sia *Tarzan' de l' Simioj*, atestis pri ties origino kaj kontinueco en la besta mondo: ili ekzistas kaj jen. La leganto povas pensi, ke marpopolo ne ekzistas... nu, en ĉi tiu libro ili ne nur ekzistas, sed ili igos vin ĝui sian mondon, siajn ideojn kaj siajn aventurojn tra la paĝoj de ĉi tiu rakonto. Kaj se ĉe la fino de la legado vi ankoraŭ pridubas, ĉu sirenoj ekzistas, ĉu ne, jen via afero, ĉar tio, kion mi celis diri priskribante tiun mondon, estas, ke vi pasigu tempon eskapante de viaj problemoj kaj zorgoj, kaj submarigi vin -neniam pli bone dirite- en ĉi tiu magia mondo de la maro.

La roluloj kaj eventoj estas tute -estus senbezzone klarigifikciaj, kaj havas nenion komunan kun homoj aŭ situacioj en la reala mondo, kaj se iel ajn ili similas al iu, la leganto sciu, ke ĝi estas pura koincido pretere de la volo kaj imago de tiu, kiu ĉi subskribas.





*Beletro*

## Defendo de Hispanio

*Ramiro de Maeztu*

### Nekomparebla Laboro

Ne estas laboro en la universala historio komparebla al tiu farita de Hispanujo, ĉar ni enkorpigis ĉiujn rasojn, kiuj estis sub nia influo, en la kristanan civilizacion. Estas vere, ke en ĉi tiuj du jarcentoj da fremdiĝo ni forgesis la signifon de nia Historio kaj la valoron de tio, kion ni plenumis en ĝi, por kredi nin malsupera kaj malĉefa raso. En la 17<sup>a</sup> jarcento, male, ni plene konsciis pri la graveco de nia laboro; Ekzistis neniu klera hispano tiam kiu ne estis konscia pri Hispanio estanta la nova Romo kaj kristana Israelo. Ĉi tiuj vortoj de Solórzano Pereira en lia *India Politiko* atestas pri tio:

*Se, laŭ la frazo de  
Aristotelo, nur la trovo aŭ  
malkovro de iu arto, ĉu  
liberala aŭ mekanika, aŭ ia  
ŝtono, planto aŭ io alia, kiu  
povas utili kaj servi al  
homoj, devus gajni al ili  
laŭdon, pri kia gloro Volos  
ne estas indaj tiuj, kiuj  
malkovris mondon, en kiu  
troviĝas kaj enhavas tiajn  
sennombrajn grandecojn  
Kaj la profito de ĉi tiu  
sama malkovro rilate al la  
nova mondo mem estas ne  
malpli estiminda, sed de  
multaj pli grandaj karatoj*

*antaŭe, ĉar krome? la  
lumon de la kredo, kiun ni  
donis al ĝiaj loĝantoj, pri  
kiu mi poste diros, ni metis  
ilin en societan kaj  
politikan vivon, forigante  
ilian barbarecon, ŝanĝante  
iliajn felajn kutimojn en  
homajn kaj komunikante al  
ili tiom da aferoj kiom  
utilaj kaj utilaj. necesaj  
kiel ili prenis de ni  
mondon, kaj, instruante al  
ili la veran kulturon de la  
tero, konstrui domojn,  
kolektiĝi en urboj, legi kaj  
skribi kaj multajn aliajn  
artojn de kiuj antaŭe ili  
estis tute fremdaj.*

Sed ni faris eĉ pli kaj ne nur Hispanion (ĉar ĉi tie mi devas diri, ke lia laboro estis daŭrigita de ĉiuj hispaniaj popoloj de Ameriko, de ĉiuj popoloj kiuj konsistigas Hispanidaron): ni alportis ne nur civilizacion al aliaj rasoj sed ion, kio Ĝi valoras pli ol la civilizacio mem, kaj estas la konscio de sia morala unueco kun ni; tio estas, la konscio pri la morala unueco de la homa raso, dank' al kiu eblis al ĉiuj aŭ preskaŭ ĉiuj hispanidaj popoloj de Ameriko iam havi rasajn virojn kiel regantojn, kiel gvidantojn, kiel poetojn, kiel direktoroj de koloro aŭ miksraso. Kaj ne estas nur ĉi tio. Eminent

brazilano, d-ro Oliveira Lima, opinias, ke en la hispaniaj popoloj estas formiĝanta rasa unueco danke al kunfandiĝo, en kiu la malsuperaj elementoj baldaŭ finiĝos malaperantaj, absorbitaj de la supera elemento, kaj tiel li estis. kapabla alfronti kun Usono de Nordameriko por diri al vi:

*Kiam ne plu estas mestizoj  
inter ni, kiam la nigra aŭ  
hinda sangoj estis diluita  
en la eŭropa sango, kiu en  
tempoj pasintaj kaj ne tre  
malproksimaj, indas  
memori, ricevis  
kontingentojn de berberoj,  
numidioj, tataroj kaj aliaj  
devenoj, vi ne "Vi ĉesos  
teni senfine ene de viaj  
limoj grupojn de  
nereduktebla loĝantaro, de  
diversa koloro kaj  
malamikaj sentoj.*

Mi ne garantias la ĝustecon de Oliveira Lima en ĉi tiu profetaĵo. Eblas, ke la unueco de la rasoj en Ameriko okazos; Ankaŭ eblas, ke ĝi ne okazas. Sed la esenca kaj plej grava afero estas, ke la unueco de la spirito jam okazis, kaj ĉi tio estas la verko de Hispanio ĝenerale kaj de ĝiaj Religiaj Ordenoj aparte; pli bone dirite, la komuna laboro de Hispanujo: de ĝiaj reĝoj, episkopoj, leĝdonantoj, magistratoj, soldatoj kaj enkomenderoj, pastroj kaj laikoj... sed en kiu la honorloko respondas al la Religiaj Ordenoj, ĉar ekde la unua tago de la

Konkero la monaĥoj aperas en Ameriko.

Jam en 1510<sup>a</sup> ni troviĝis sur la Hispana Insulo kun Pastro Bernardo de Santo Domingo, okupita de la tasko memori, ekde siaj unuaj predikoj, ke en la testamento de Isabella la Katolikino oni diris, ke la ĉefa celo de la pacigo de Indioj. ne estis Ĝi konsistis el nenio alia ol la evangeligado de siaj loĝantoj, por kio ŝi rekomendis al la Reĝo, ŝia edzo, Don Fernando, kaj iliaj posteuloj, ke ili estu la plej bona traktado. Ili citis ankaŭ la buleon de Aleksandro la 6<sup>a</sup>, en kiu, doninte al Hispanio la regadojn de la landoj de Okcidento kaj Sudo, oni precizigis, ke ĝi estas kun la kondiĉo instrui la indiĝenojn pri la kredo kaj bonaj kutimoj. Kaj estis la konstanta agado de la Religiaj Ordenoj, kiu reduktis la avidecon mem de la *encomenderos* kaj la arogantecon de la vicreĝoj al la limoj de justeco.

La pieco de tiuj unuaj dominikaj monaĥoj estis kio kaŭzis la alvokiĝon en Br Bartolomé de Las Casas kaj igis lin konfesi en la Ordeno de Sankta Dominiko, ĝis li poste iĝis la apostolo de la indianoj kaj ilia defendanto, kun tia rava bonfarado, kiu ne ĉesis troigi, pligrandigi kaj troigi la kruelecojn neeviteblajn al la

konkero kaj ankaŭ troigi la dolĉecon kaj afablecon de la indianoj, tiel igante nin malfortulo. servo al la hispanoj, ĉar li estis la kreinto de la Nigra Legendo; sed, samtempe, la inspirinto de tiu reformo de la leĝoj de Indioj, al kiu ŝuldiĝas la aliĝo de la indiĝenaj rasoj en la kristanan civilizacion.

## La ago de la Reĝoj.

Nun, plenumante ĉi tiun funkcion la Religiaj Ordenoj nur plenumis la eksplicitajn ordonojn de la Reĝoj. En 1534, ekzemple, kiam Karolo la 5-a donis la kapitulacion por la teroj de la Plata-Rivero al D. Pedro de Mendoza, estis strikte deklarite ke Mendoza devis kunporti religiajn kaj ekleziajn homojn, el kiuj li devis preni zorgi pri ĉiu ilia progreso; Li ne devis plenumi ajnan agon, kiu antaŭe ne meritis la aprobon de tiuj ĉi ekleziuloj kaj religiuloj, kaj kvar aŭ kvin fojojn la kapitulaco insistis, ke nur se li plenumis ĉi tiujn instrukciojn, ĝi donis al li la rajton super tiuj teroj; sed ke, se li ne aliĝus al ili, ĝi ne estus koncedita.

La kondiĉoj de tiu kapitulaco de 1534<sup>a</sup> poste estas konservitaj kaj ripetitaj fare de ĉiuj Monarkoj de la Domo de Aŭstrio kaj la unuaj du Burbonoj. Ili ne donis teron en Ameriko krom se ĝi

estis kun la esprimo kaj strikta kondiĉo de kontribui al la katekezo de la indianoj, traktante ilin en la plej bona ebla maniero. Kaj tiel oni atingis, ke la enkomenderoj mem, malgraŭ sia avideco al elmigrantoj serĉantaj riĉaĵon, vere fariĝis misiistoj, ĉar ĉe krepusko ili kolektis la indianojn sub la Kruco de la urbo kaj endoktrinis ilin. Kaj estis la Religiaj Ordenoj por devigi ilin observi la kondiĉojn de la Reĝoj kaj respekti la volon de Isabel' la Katolikulino kaj la Bulon de Aleksandro la 6-a, kiujn ili neniam laciĝis rememori en siaj predikoj, en kiom da jarcentoj la hispana dominado estis konservita en Ameriko.

La efikeco, nature, de tiu ĉi civiliza ago dependis de la perfekta interkompreno inter la du potencoj: la tempa kaj la spirita; interkompreno kiu ne havas ekzemplon en la historio kaj tio estas la karakteriza originaleco de Hispanio antaŭ la cetero de la mondo.

La hispana soldato en Ameriko konsciis, ke lia esenca kaj grava funkcio estis unue nur en la ordo de tempo; sed ke la fundamenta ago estis tiu de la misiisto, kiu katekigis la indianojn. Aliflanke, la misiisto sciis, ke la soldato kaj la vicreĝo kaj la oidoro kaj la alta oficisto ne persekutis aliajn celojn ol tiujn,



kiujn li mem serĉis. Kaj, kiel sekvo, estis perfekta interrilato inter la du specoj de aŭtoritatoj, la eklezia kaj la civila kaj arma, tia kia ne okazis en iu lando. Patro Astrain, en sia grandioza Historio de la Societo de Jesuo, priskribas ĉi tiun kombinaĵon de aŭtoritatoj en kelkaj linioj:

*Apud Hernán Cortés,  
Pizarro, kaj aliaj  
kontestroj, la katolika  
pastro, ordinare religiema,  
iris por konverti la  
malfidelulojn al la  
Evangelio, kiujn la  
militistoj subigis  
Hispanion, kaj kiam la  
barbaroj atencis kontraŭ la  
vivo de la misiisto, La  
hispanoj. kapitano estis tie  
por defendi lin kaj por  
instrui al la agresantoj  
lecionon.*

Kaj aŭgustenano, Patro Vélez, donas al ni ideon pri kio estis la fundamento de ĉi tiu interrilato, parolante pri Fr Luis de León, li diras al ni, rilate la Inkvizicion:

*Por pravigi kaj adekvate  
taksi la Hispanan  
Inkvizicion, ni devas antaŭ  
ĉio konsideri la ecojn de  
ĝia nacia karaktero,  
precipe la intima kuniĝo de  
Eklezio kaj Ŝtato en  
Hispanio dum la 16-a kaj  
17-a jarcentoj, ĝis la  
punkto esti teokratia. ŝtato,  
ortodokseco estanta la  
devo kaj leĝo de ĉiu  
civitano, kiel iu burĝa*

*preskribo.*

Nu, tiu ĉi teokratia Ŝtato —la plej malklera, la plej superstiĉa, la plej mallerta kaj mallerta, laŭ la opinio de la revolucia gazetaro — finas atingi tion, kion atingis neniu alia civiliza popolo, nek Anglio kun siaj hinduoj, nek Francio kun siaj araboj, nek Holando kun siaj malajoj sur la insuloj de Malajzio, nek Usono kun siaj nigruloj kaj indiĝenaj indianoj: asimili en sian propran civilizacion ĉiujn kolorajn rasojn, kiujn ĝi subigis. Kaj en neniu alia lando denove okazis tia perfekta kunordigo de religiaj kaj tempaj potencoj, kaj ĝi ne okazis pro manko de religia unueco, el kiu la Registaro devis inspiriĝi.

Ĉi tiuj aferoj ne estas akvo el la pasinteco, sed prefere ekzemplo kaj gvidilo, el kiu la estonteco devas esti inspirita. Homoj same laboremaj kaj subtilaj kiel tiuj de Azio kaj same plenaj de vivo kiel tiuj de Afriko, ne devas esti eterne kontentaj pri sia nuna malsupereco. Baldaŭ ni devos elekti inter ĉu ili estas niaj fratoj ĉu niaj mastroj, kaj se la Homaro fariĝos ununura familio, kiel ni devas deziri kaj deziri kaj ĉi tiu estas la fino, al kiu povus konverĝi la plej viglaj kaj heterogenaj sociaj kaj historiaj movadoj, ĝi estos necesa por la Ŝtatoj. Se estus venkinta alia teorio de la

Pravigo, la homoj estus falintaj en formon de fatalismo, kiu ĵetintus ilin indiferece en la subpremado de aliaj aŭ en servilecon. La nekatolikoj forlasis sin al la fonto de fiero, kiu helpis ilin venki dum kelka tempo; sed tio kondukis ilin lastatempe (ĉar Dio volis, ke la sperto okazu), iom post iom ellasi tion, kio estis kristana en ili, fali en sian nunan paganismon, sen scii, kian sorton havas por ili la estonteco, ĉar ili estas tiom multe; ĝiaj perpleksaĵoj, ke, apud ili, niaj propraj maltrankviloj estas someraj nuboj.

## Tuta urbo en misio.

La tuta Hispanio estas misiisto en la 16<sup>a</sup> jarcento. Ĉio ŝajnas plena de la spirito, kiun Jakobo la Malgrandulo esprimas, kiam li diras ĉe la fino de sia epistolo, ke: *Kiu igas pekulon konvertiĝi de la eraro de sia vojo, tiu savos sian animon de morto kaj kovros la amason da liaj pekoj.* (V, 20.) Ĉu reĝoj, ĉu prelatoj, ĉu soldatoj, ĉiuj hispanoj de la 16-a jarcento ŝajnas misiistoj. Aliflanke, dum la 16-a kaj 17-a jarcentoj ekzistis neniuj protestantaj misiistoj. Kaj ne povus esti. Se oni kredas, ke Pravigo ŝuldiĝas nur al la meritoj de Nia Sinjoro, estas malmulte aŭ nenio, kion la misiisto devas fari; Lia ofero estas senefika.

La Hispanio de la 16<sup>a</sup> jarcento, male, konceptas la religion kiel batalon, en kiu la venko dependas de sia klopodo. Sankta Tereza parolas kiel soldato. Ŝi imagas la religion kiel fortikaĵon en kiu la teologoj kaj pastroj estas la kapitanoj, dum ŝi kaj ŝiaj monaĥinoj el San-Joseo helpas ilin per siaj preĝoj; kaj skribu versojn kiel ĉi tiujn:

*Vi ĉiuj, kiuj estas aktivaj  
sub ĉi tiu flago,  
ne dormu plu, ne dormu  
plu,  
ke ne estas paco sur la  
tero.*

Ŝajnas, ke milita impeto skuas nian monaĥineton de la kapo ĝis la piedoj.

La Societo de Jesuo, kiel la aliaj Ordenoj, estis fondita por la pli granda gloro de Dio kaj ankaŭ por individua perfekteco. Nu, tamen, la paĝo de la Kompanio, Rivadeneyra, forgesas, kiam li difinas sian celon de plibonigo kaj ĉion alian. Kion li ne forgesas estas la misia laboro, kaj tiel li diras: *Supozeble la celo de nia ĉefa Kompanio estas redukti la hereziulojn kaj konverti la naciaĵojn al nia plej sankta kredo.* La parolado de Laínez estis farita en 1546<sup>a</sup>; Ĉar pasis ses jaroj, ekde la komenco de 1540, ke sankta Ignaco sendis sanktan Franciskon al Indioj, kiam li ankoraŭ ne ricevis la aprobon

de la Papo por sia Kompanio krom parole.

Necesas rimarki, ke, kiel diras Patro Astrain, la membroj de la Societo de Jesuo lokas Sanktan Franciskon Xavier sur la saman nivelon kiel Sankta Ignaco, "kiel ni metas Sanktan Paŭlon kune kun Sankta Petro ĉe la kapo de la universala Eklezio". Kion li volas diri per tio estas, ke tio, kion Sankta Ignaco donis, kiam li sendis Sanktan Franciskon al Indioj, estis preskaŭ lia propra memo; Se li ne iris, estis ĉar kiel generalo de la Kompanio li devis resti en Romo, ĉe la sidejo; sed al la viro, kiun li plej amis kaj respektis, li sendis la misiiston el Indioj. Misiista laboro estis tiel esenca por la hispanoj!

Patro Vitoria mem, hispana dominikano, la instruisto, rekte aŭ nerekte, de la hispanaj teologoj de Trento, malamiko de milito kiel li estis kaj tia amiko de la indianoj, ke neniel li konfesis, ke ili povas esti konkeritaj perforte. ili faru la ĝustan kredon, diras ke se la indianoj permesis al la hispanoj libere prediki la Evangelion, ne estis rajto militi kontraŭ ili en ajnaj cirkonstancoj, *ĉu ili aŭ ne ricevas la kredon*; nun ke, se la indianoj malhelpas al la hispanoj prediki la Evangelion, *La hispanoj, bone rezonante, por eviti skandalon kaj malpacon, povas ĝin*

*prediki malgraŭ si, kaj komenci la laboron konverti la koncernajn homojn, kaj se por ĉi tiu laboro; estas esence komenci akcepti militon, ili povos fari tion, kiel necese, por ŝanco kaj sekureco en la predikado de la Evangelio.* Tio estas, la plej paca homo, kiun la mondo produktis, la kreinto de la internacia juro, la finfina iniciatinto de ĉiuj reformoj favoraj al la aborigenoj, kiuj honoras niajn Hindajn Leĝojn, legitimas la saman militon kiam ne ekzistas alia rimedo por malfermi la vojon al la vero.

Tial oni povas diri, ke la tuta Hispanujo estas misiista en siaj du grandaj jarcentoj, eĉ en malutilo de sia propra plibonigo. Tiu ĉi neglektado eble estis malutila; Eble estus taŭge dediĉi parton de la misia energio por spirite armi nin, tiel, ke ni povus rezisti, en sinsekvaj jarcentoj, la fascinon, kiun eksterlandaj civilizacioj praktikis sur ni. Sed ĉiu tago havas sian deziron. Estis la tempo, en kiu la fizika unueco de la mondo estis konfirmita, kiam la maraj vojoj de la Oriento kaj Okcidenta; Ĉe Trento nia kredo je la morala unueco de la homa raso estis konfirmita; ĉiuj homoj povus esti savitaj, jen la intima konvinko, kiu plenigis niajn animojn. Ne estis la tempo por pensi pri nia propra plibonigo aŭ pri ni mem; La bona novaĵo



devis esti alportita al ĉiuj anguloj de la tero.

## Guaranaiaj misioj.

Ekzemploj de tio, kio povas esti entreprenita kun ĉi tiu spirito, estas ofertitaj al ni de la Kompanio de Jesuo en la Guarani-misioj. Ili komenciĝis en 1609, kun kelkaj el la Patroj mortantaj martiroj. La ĝuaranioj estis militistaj triboj, nedresitaj; nestigitaj ĉe la bordoj de grandaj riveroj, kiuj kutime ŝanĝas sian kurson de jaro al jaro; Ili vivis el ĉasado kaj fiŝkaptado, kaj se ili plantis iajn rikoltojn, ili apenaŭ zorgis rikolti ilin; Kiam iu ĝuarania virino bezonis iom da koton, ŝi plukis ĝin el la plantoj kaj lasis la ceterajn putri tie; ili ne sciis pri posedaĵo; Ili ankaŭ ignoris la monogamian familion; ili vivis en stato de seksa malĉasteco; Ili praktikis kanibalismen, ne nur pro kolero, kiam ili militkaptis, sed ankaŭ pro glutemo; Ili havis siajn kvalitojn: ili estis kuraĝaj, sed ilia kuraĝo kondukis ilin al krueleco; Ili estis malavaraj, sed malavareco sen antaŭvido; Ili amis siajn gefilojn, sed ĉi tiu korinklino igis ilin permesi al ili ĉiajn ekscesojn sen iam riproĉi ilin... La jezuitoj eniris tien sen milita helpo, kvankam pro misio de la reĝoj, kiuj jam ellaboris la juran kadron al kiu la laboro devis konformiĝi.

Neniam antaŭe blankuloj transiris la immensecon de la paragvaja ĝangalo kaj pastro Hernández diras, ke kiam ili veturis en kanuo tra tiuj riveroj, en tiuj grandegaj solecoj, ili ludis la fluton pli ol unu fojon por trovi kuraĝon, per kiu daŭrigi sian taskon plena de tiom. multaj danĝeroj kaj tiom da seniĝoj. Kaj la indianoj sekvis ilin, aŭskultante ilin, de la bordoj. Sed estis io en la ĝuaranioj kapabla komprenigi al ili, ke tiuj Patroj suferas malfacilaĵojn, ili oferis sin por ili, ili forlasis sian patrujon kaj sian familion kaj ĉiujn esperojn de la surtera vivo, simple por plenumi sian bonfaranon, kaj iom post iom Rilato de reciproka korinklino estis establita inter la doktrineroj kaj la endoktrinuloj.

Fakto estas, ke meze de la 18-a jarcento tiuj malriĉaj ĝuaranioj ekkonis kaj ĝuis posedaĵojn, ili loĝis en domoj same puraj kaj ampleksaj kiel tiuj de iu ajn alia urbo en Ameriko; Ili havis grandiozajn templojn, ili amis siajn jezuitojn tiel profunde, ke ili ne akceptis punon de ili sen kisi la manojn dum genuiĝo, kaj dankante ilin; Ili kuraĝe venis al la defendo de la hispana imperio kontraŭ la invadoj kaj irrupcioj de San-Paŭlo kaj Brazilo; Ili kontribuis per sia laboro kaj klopodo al la starigo de la ĉefaj monumentoj de Bonaero, intera-

lie la nuna Katedralo mem... Kaj nur pro mensogo, filino de malamo, eblis al ili forlasi la Patrojn.

Jen kiam tiu Patricia Internacia, pri kiu parolis mia forpasinta amiko D. Ramón de Basterra, transprenis plurajn Eŭropajn Kortumojn kaj decidis estingi la Societon de Jesuo, kiel la unua paŝo por disbati "la fifaman". Tiu Patricia Internacia sendis guberniestron nomitan Francisco Bucareli al Bonaero, plene identigita kun ĝiaj principoj. Bucareli timis, ke la indianoj malhelpos la jezuitojn foriri en la tago de aplikado de la ordono de elpelo de la Kompanio, kiun li jam havis kun si, kaj por povi plenumi ĝin sen malhelpo li havis la ideon havi la Jezuitaj Patroj mem senkulpe sendas lin al Bonaero plurajn kacikojn kaj kacikojn, kaj la unua afero, kiun li faris kun ili, estis vesti ilin per la kostumoj de la nobeloj de la 18-a jarcento, sufiĉe historiaj en tiu tempo, la sama kiel en Hispanio. en Parizo, kaj dirante al ili, ke ili estas same grandaj sinjoroj kiel li, kaj la aliaj guberniestroj kaj episkopoj, li sidigis ilin ĉe sia tablo, li igis ilin aŭdi meson kun li en la Katedralo, li konvinkis ilin, ke ili ne permesu al si estu regita de la jezuitoj. Kaj tiamaniere li sukcesis igi tiujn kompatindajn sensuspektajn indianojn perdi la

respekton kaj amon, kiun ili havis al la Patroj. Aliflanke, la antaŭzorgoj de Bucareli estis senutilaj, ĉar la jezuitoj akceptis la ordonon forlasi hispanajn regadojn kun la pasio, kun la rezigno, kun la forto de volo, kiu karakterizis la Ordenon ĉiam. La lingvo, kiun Bucareli uzis ĉe la indianoj, estis esence la sama kiel tiu, per kiu la serpento instigis Evan manĝi la frukton de la malpermesita arbo: *Eritis sicut dii*: Vi estos kiel dioj. Se vi forlasos la Jezuitajn Patrojn, vi estos egala al ili aŭ eĉ pli granda.

Dum kelkaj jaroj, fakte, ĉar la jezuitoj estis sukceditaj de la franciskanoj, ne malpli heroaj ol ili, la Doktrinoj daŭris, kvankam, nature, ne tiel bone kiel antaŭe, ĉar la La novaj Patroj estis novaj al tiuj teritorioj kaj ne konis siajn indianojn; Sed poste ankaŭ al la franciskanoj mankis la protekto de niaj aŭtoritatoj, poluitaj de framasona furiozo. La rezulto estas, ke post tridek jaroj, la doktrinoj malaperis, la indianoj revenis al la barbaro, la temploj konstruitaj falis, la domoj de la indiĝenaj homoj disfalis kaj la nombro de tiuj malriĉuloj rapide malpliiĝis, ĉar ili estis devigitaj batali kontraŭ la feroca Naturo, kiu finis ilin konsumi. Tia estas la frukto de la vortoj de la diablo por tiuj, kiuj ilin kredas.



# Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio  
de Laboristoj Esperantistaj



---

<http://www.gazetoteko.com/hale/kels134.pdf>

---

Numero 134<sup>a</sup> - Januaron de 2025<sup>a</sup>



ISSN 1886-1938 (printita)  
ISSN 1886-1997  
Depósito legal: Z-2398-88